

Kálmán Kalocsay

En amara horo

Claude Gacond, 426-a radioprelego, 1971.12.08 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Hodiaŭ ni provos legi al vi poemon de Kálmán Kalocsay, kiu bone respegulis kaj eble ankoraŭ respegulas la situacion de la verkistoj, kiuj elektis esperanton kiel labor-lingvon. Aŭskultante tiun poemon vi meditu pri la senesperiga situacio de tiuj verkistoj, kiuj skribas en lingvo orfa (Zamenhof ne plu vivas), senpotenca (neniu agnoskita institucio ĝin jure protektas), senforta, senmatura (ĝi estas apenaŭ pli ol projekto de lingvo), svenema kaj senhelpa kaj eble senespera (oni ankoraŭ dubas pri ĝia estonteco), sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura. Tiam la poeto sentis sin sen popolo. Ni lasas vin decidi, ĉu nun li sentas sin malpli sola ? **En amara horo**, poemon de Kálmán Kalocsay.

Cl.- Nenio estas vi nenio,
Se, pri la senco sen konscio,
Vi hurlas pri la « nova sento » !
Mi volus scii vin fermento,
Potenca povo, fort' magia :
Dormema « rondo familia ».

Ĉu la ĝiskreva himnokanto
Kolekta, koresponda vanto,
Kaj ke pri gramatikreguloj
Disputas aro de stranguloj
Rajdante sur la Fundamento :
Jen estas do la Nova Sento ?

Ke rifuĝante de la devoj,
Nur gapas vi kun strabaj revoj
Kaj alpreninte dignan pozon
Kelkfoje ĵetas vi almozon
Sur la altaron de l' Afero :
Ĉu tio estas do ofero ?

Mi batas. Fraton batas frato,
Lin mem turmentas ĉiu bato.
Ho, gento, gento, verda gento!
Mi volus scii vin fermento,
Potenca povo, gvida torĉo,
En serĉ' malbona – bona sorĉo !

Kaj, kvankam « stranga sekto eta »,
Sed fidi, lukti, venki preta,
Por kiu, malgraŭ ĉia moko,
La mond-iranta Forta Voko
Ne sangmalriĉa iluzio,
Sed estas kredo, religio !

Oferoj nutras la aspirojn,
Postulas ĉiu venk' – martirojn !
Ne kovru palo vian vangon,
Neniu volas vian sangon,
Sed donon, faron kaj fervoron
Kaj koron, sed la tutan koron !

Kálmán Kalocsay

En amara horo

Claude Gacond, 426-a radioprelego, 1971.12.08 & 11

Ve, ĉio vana ! Mi konscias,
Ke en dezerto mi forkrias.
Vi restos plue en kvieto
Amuziĝanta societo.
Ho, kie estas la konsolo
Por mi – poeto sen popolo!

Poeto sen popolo, ho animprema scio,
Ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko...
Forsonos senresone la plora melodio,
Kiel ŝirita kordo en forlasita loko.

Ĉu plu projekti, fidi kaj revi malgrandknabe,
Kaj meti mozaikon el la lingveroj splitaj,
Aŭ ĵeti for el mano la plumon, kiel Kabe,
Kaj eksilenti – patro de versoj abortitaj ?

Pli oportune estus kaj certe pli prudente :
La vanajn sapvezikojn plu ne flugigi blove,
Kaj ektirinte ŝultrojn feliĉindiferente,
La *Kanton de la Slavo* ne kanti plu Schulhofe.

Sed kien iri ? Kie troviĝas idealo,
Sur kiu mi ne vidus malican ekrikanon,
En kies altartukon, freneze, post batalo,
Neniu adoranto jam viŝis sangan manon ?

Ho, jen vi, Esperanto ! Ne glora kaj fiera,
Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,
Svenema kaj senhelpa kaj – eble – senespera,
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.

Mi konas vin. Enkore vi kantis najtingale
En nokto de la mondo. Vi kiel povis trili!
Vin oni ne aŭskultis, buĉadis sin « reale »...
Ĉu ŝtopu mi l' orelojn por ilin eksimili ?

Ne ! En la kor' plusonu la kanto dolĉetrila,
Ho, kantu birdo eta, senforta, kara, kara !
Vi estu mia bela mensogo sorĉebrila,
Vi estu la konsolo en nia mond' amara !

A.- En artikolo titolita *Kion fari por la Esperanta literaturo* ? kies erojn ni citos la venontan semajnon, Kalocsay reaŭdigas tiun alvokon de poeto sen popolo. Tamen tiu dua alvoko ŝajnas al ni malpli amara. Eble Kalocsay havas la impreson, ke tamen li estas malpli sola. Povu la ondoj de nia Svisa Radio sciigi al li, ke la mondo, en kiu li parolas, ne plu estas tute dezerta, ke kelkaj homoj lin aŭdis.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-